N. N. 58,

# Ŝipista kanto

*tradukita de Frieder Weigold*

En maro dronas ora sun',
Spiras aromojn nokta vent'.
Arĝenta cigno flosas nun
Tra l'steloplena firmament'.
Naĝas ŝipeto tra la akva kur',
Kordojn arĉtiras la zefir'.
Amvel' briletas en velur'
Stiras sekure la sopir'.

Ĉe mi ripozu, karulin'
Sur la ondada mara um'.
Kaj dolĉa kanto lulu vin
En la arĝenta luna lum'.
Pelas karese ondojn milda vent',
Nordstela bril' en la ĉiel'.
Ja sonĝu laŭ sekura sent';
Ke gvidos mi al kuna cel'.

Balance sub la gvida firm'
Naĝas la eta ŝipo for.
Sekure en la konka ŝirm'
Kuŝas vi, perla la trezor'.
Ke mia brako daŭre ŝirmu vin,
Ke estu tiu konko ĝi!
Al vi ĝi pretas, ho princin',
For de'l stiril' en l'ondoj ĉi.

*Traduko de la Germana poemo "Schifferlied" de N. N. 58 en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-834-1675 (2013-02-28 17:53:47)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2010-12-28 tiun ĉi tradukon de la kanto de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio, tel. 0049-(0)89-805687), kiu mem faris la tradukon en Esperanto.*